

Protokolo de la Komitato de ILEI en Kunmingo, sesio 3

Ĝi okazis en Salono Cai Yuanpei, 26-an de Julio 2012, inter 11:10 kaj 12.20.

La nova estraro kaj la ĉeestantaj estraranoj estis jam prezentitaj en la publika forumo pri la estonta agado, okazinta tuj antaŭ la komitata kunsido, do ne necesis ripeti tion.

La nove reelektita prezidanto de ILEI, Stefan MacGill, proponis, ke ni esprimu nian sinceran kondolencon por la forpasintoj de la pasinta jaro, kiuj brile kontribuis al la ILEI-movado. Li laŭtlegis la nomojn, kiuj aperis en la jarraporto. Unu minuton oni meditadis.

La komitatanoj aprobis la unuan protokolon unuanime. La dua kaj tria protokoloj disiros rete kaj la komitatanoj rete voĉdonos pri ili.

Rilate al la aliĝo-peto de la Nepala sekcio, la membro-postulo estas intertempe solvita, sekve la propono revenas. Restas la kondiĉo ke la postulita statuto iru al la nova komisiito, Mirejo Grosjean. La komitato akceptis la aliĝpeton kun 1 sindeteno.

Libere diskutis la komitatanoj pri estontaj ILEI-planoj; la estontaj konferencoj fariĝis la ĉefa temo. La sekva konferenco estas decidita, kaj informoj jam aperis. En la jaro 2013 la 46-a konferenco okazos en Herzberg-Sieber (Germanio) en la semajno antaŭ la UK, kun unu plene libera tago inter la du aranĝoj por ebligi la vojaĝadon – sed definitivaj datoj estas nekoneblaj, ĝis la UK-datoj estos anoncitaj. Nia kontrakto-partnero estos nia germana sekcio, AGEI.

La prezidanto komunikis, ke ILEI havas klarajn planojn konferenci denove en Afriko en iu el la sekvaj jaroj, eventuale kunlabore kun TEJO kaj IJK. Mirejo Grosjean estas komisiita fari esplorkomisionojn en kelkaj landoj (i.a. Senegal, Benino, Burundo) kaj raportoj al ni en januaro 2013.

Ana Montesinos rekomendis, ke la ILEI konferenco okazu en iu urbo de Argentino en la jaro 2014 (la UK okazos en Bonaero). Tiu ideo rikoltis bonan nivelon da apogo. Stefan MacGill komentis, ke antaŭkondiĉo devos esti la fondo de argentina ILEI-sekcio, por kiu la potencialo certe ekzistas.

Nek UK nek nia konferenco estas decidita por 2015, sed la centa UK kredeble okazos en Lille, norda Francio – pro la proksimeco al Bulonjo-sur-Mar, la urbo de la unua UK. Tio malfermas la vojon por konferenco en Belgio (Antverpeno?) aŭ norda Francio. Ŝvebas ideoj pri komuna aŭ paralela kongreso kun SAT (kiel okazis en Bratislavo en 2004) kaj eble IFEF. 2015 estos elekto-jaro por ILEI.

Ni anoncis pri la 'Tago de la Lernejo', kiu okazos en la hanoja UK en mardo, kaj pri la bezono de helpantoj por la Movada Foiro kaj la budo de ILEI.

Kun danko al la komitatanoj pro ilia konstrua partopreno, la prezidanto fermas la lastan komitatan sesion en Kunmingo.

Protokolis: s-ro LEE Jungkee,

Poluris: SMG kaj Rob Moerbeek 27a de aŭgusto, 2012

Aprobata de la komitato per reta voĉdono finiĝinta en la 31a de aŭgusto, 2012

La protokolo aperas kiel serĉebla PDF, kreita per Nuance PDF Create 7.

